

“Ĉu ne *iu*” preskaŭ sarkasme demandis Alicio “antaŭe diris en la kuirejo ke la kondiĉo de tiu rondiro estas ke ĉiu atentu nur sian aferon?”

“Nu, la signifo ja estas preskaŭ sama” diris la Dukino, ŝultrumante Alicion per sia mentonego, “kaj de tio la moralo estas: ‘Se vi prizorgas la sencon, la sonoj prizorgos sin mem.’”

“Ĉe ĉiu afero ŝi ja volas trovi moralon” pensis Alicio.

“Vi eble miras, kial mi ne ĉirkaŭprenas al vi la talion” diris iom poste la Dukino. “La kaŭzo estas, ke mi dubas pri la bonhumoro de via fenikoptero. Ĉu mi faros la provon?”

“Ne, li eble mordus vin.” Alicio diris tion pro singardaj motivoj; ŝi tute ne deziris la provon.

“Estas vero” respondis la Dukino. “Fenikopteroj kaj mustardo ambaŭ mordas; kaj jen la moralo: “Samspecaj birdoj flugas kune.”

“Tamen mustardo ne estas birdo” Alicio kritikis.

“Vi estas prava, kiel ĉiam” afable konsentis la Dukino. “Mi tre admiras vian spritecon; per viaj paroloj vi ja igas ĉion klara.”

“Mi kredas ke mustardo estas mineralo, ĉu ne?” diris Alicio.

“Jes, kompreneble,” diris la Dukino. (Ŝi ŝajne estis preta konsenti al ĉio ajn de Alicio dirota.) “Ne malproksime de tie ĉi mi mem havas grandan mustardminejon, kaj la moralo: ‘Da tio kion mi jam havas *en min*’, vi ne tro enigu *en min*.’”

Alicio dume profundigis en pensojn, kaj pro tio ne atentis—eĉ ne aŭdis—pri la dukina minejo. Post unu minuto ŝi ekkriis:

“Ho jam fine mi bone memoras: Mustardo estas legomo, kvankam ĝi ne havas la aspekton esti tia.”

“Mi tute konsentas” denove diris la konsentema Dukino “kaj jen la moralo:—‘Vi ĉiam estu laŭ la aspekto’—aŭ se vi volas ke mi esprimu ĝin pli klare:—‘Vi neniam imagu al vi ke vi ne estas aliaspekta ol tio, kio al aliaj ŝajnus ke kio vi aŭ estis aŭ aspektus esti, ne estas aliaspekta ol kio vi antaŭe estis, estus ŝajninta al ili esti aliaspekta.’”

“Mi kredas ke *tio* mi povus pli bone kompreni” diris Alicio tre ĝentile se mi havus ĝin skribitan antaŭ la okuloj; sed, bedaŭrinde mi ne tute sukcesis kapti la signifon dum vi parolis.”

“Tio ja” diris la Dukino per tre memkontenta voĉo “estas nur nulaĵo kompare kun la diroj kiujn mi povus eldiri.”